


WordPressa stilo

- ✓ La stilo estas iomete formala, do: *Kio estas nova?* anstataŭ *Kio novas?*
- ✓ Klareco gravas. Ni ne volas konfuzitajn uzantojn. Pro tio, uzo de plenaj vortoj estas rekomendita, se spaco permesas. Ekz: *email address* = *retpoŝtadreso* anstataŭ *retadreso*.
- ✓ Por butonoj, ni volas uzi i-verbojn (infinitivon). Sed okaze de instrukcioj al la uzanto, ni volas uzi u-verbon (imperativon). Pri butonoj, la penso iras, 'Por , alklaku tiun ĉi butonon.'
- ✓ Por anglaj vortoj kiel *format* kaj *multimedia* la kutimo en la traduko de WordPress estas uzi kunmetaĵojn kaj memstarajn vortojn el la baza vortstoko de Esperanto, do: *tekstaranĝo* aŭ *prezento* = *post format* kaj *aŭdvidaĵo* = *multimedia item*.
- ✓ *Tiu ĉi* estas la kutima ordo de tiu frazo por WordPress, ne *ĉi tiu*.
- ✓ Majuskligado sekvu la kutimon de Esperanto, ne la anglan tradukendan frazon. Do, *Your Comment* = *Via komento*. Same pri interpunkcio. Imitindan ekzemplon donas la konvencio de [Monato](#).
- ✓ Mallongigoj foje estas devigaj. Bedaŭrinde, multaj mallongigoj ne estas komune uzataj inter parolantoj de Esperanto, do ni tradukantoj devas zorgeme pripensi ĉiun nekutiman mallongigon.
- ✓ Komputilaj akronimoj kaj mallongigoj estas lasitaj netradukitaj, escepte se ili havas jam konatajn esperantlingvajn ekvivalentojn. Ekz: *URL*, *http* kaj *PHP* restas netradukitaj.
- ✓ Propraj nomoj estas lasitaj netradukitaj, escepte se ili havas jam konatajn ekvivalentojn en Esperanto. Ekzemple, 'WordPress' restas netradukita; tamen, se vi volas aldoni finaĵojn -o, -a kaj -e, en ordo. Tamen, kunteksto gravas. Ekzemple, nomoj de multaj kromprogrametoj estis tradukitaj, ĉar la nomoj estas ofte montritaj en la fasado: *Categories* = *Kategorioj*, *Archives* = *Arkivoj*, k.s. Pro tio, la kromprogrameto kun nomo *Ephemera* ricevas la preskaŭ identan esperantlingvan nomon *Efemer-*.
- ✓ Dato kaj horo laŭ PHP: Vidu [Formatting Date and Time](#). Ni uzas 24-horan tempon. *G:i* estas 24 horoj (G:) kun minutoj (i). La datordo estas tago, monato, jaro. '*j F Y*': *j* = cifera tago, *F* = teksta monato, *Y* = 4-cifera jaro. '*d m Y*' = 2-cifera tago, 2-cifera monato kaj 4-cifera jaro.
- ✓ Lasu la kodon. Ekz: *%1\$d × %2\$d pixels* = *%1\$d × %2\$d bildopunktoj*. Ne traduku 'times'. Vorto inter '&' kaj ';' estas kodo.

Por WordPressaj terminoj, konsultu niajn glosarojn [Development](#), [Administration](#) kaj [Network Admin](#) kaj la [Glossary](#) in Codex. Kiam vi tradukas kaj vidas anglan vorton kun subaj punktoj, ŝvebigu la muson super tiu vorto por vidi la korespondan esperantlingvan terminon el la glosaro.